

Profesoro Charles Baudoin
Claude Gacond, 59-a radioprelego, 1964.01.15 & 18

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri profesoro Charles Baudoin, granda psikologo kaj samideano, kiu vivis en Ĝenevo.

En la fino de la monato aŭgusto 1963 mortis Charles Baudoin, unu el la plej famaj svisaj psikologoj. Unu el liaj amikoj, la granda neŭŝatela pedagogo Pierre Bovet, povis diri sen troigo : « Baudoin ne estis esceptulo, li estis unikulo ! »

Dum tiel mallonga elsendo ni ne havos la tempon analizi la gravecon de la verkaro kaj instruado de profesoro Charles Baudoin. Nia intenco estas nur lumigi kelkajn aspektojn de lia riĉa personeco.

Dum la unua Somera Universitato okazinta dum la 17-a Universala Kongreso (Ĝenevo, 1925) Charles Baudoin prezentis du prelegojn pri psikagogio. Li poste ree prilaboris sian tekston, ĝin iomete pliampleksigis, kaj tiel naskiĝis tre instruiga libreto titolita *La Arto de Memdisciplino aŭ Psikagogio*. En ĉiuj bibliotekoj de la esperanto-grupoj oni riskas trovi ekzemplerojn de tiu libro, ekzemplerojn bedaŭrinde tro malofte legataj. Unu el la celoj de tiu libreto estas helpi ĉiun homon liberigi sin per si mem, liberigi sin de siaj timoj, patologiaj statoj, malsukcesoj, alportante iom da lumo en fako ankoraŭ tro ofte malluma por la plej multo de la homoj. En pluraj ĉapitroj tiu libreto nun bezonus kelkajn renoviĝojn, ĉar dum kvardeko da jaroj la psikanalizo faris grandajn progresojn. Charles Baudoin, per sia vasta verkaro kaj serĉemo, estas unu el la fakuloj, kiuj plej multe alportis al tiu scienco kun Freud, Adler kaj Jung. Verŝajne Baudoin ludis grandan rolon, ĉar li ne estis skolema. Lia kapablo sintezi permesis al li repacigi ofte kontraŭajn vidpunktojn.

La lasta libro de Baudoin ne ankoraŭ aperis. Ĝi estas presata. Ĝi titoliĝos *L'oeuvre de Jung et la psychologie complexe (La Verkaro de Jung kaj la kompleksa psikologio)*. La tridek unuaj paĝoj de tiu libro celebros la vivon kaj personecon de Jung. Tio pruvas la grandan estimon kaj amikecon, kiuj ekzistis inter Charles Baudoin kaj Jung, kiu ĵus mortis antaŭ tri jaroj. *La Tribune de Genève* prave diris : « En tri jaroj la psikologio en Svislando estas elkapigita de du el siaj plej eminentaj reprezentantoj : Carl-Gustav Jung kaj Charles Baudoin. » Mi aldonos, ke se ambaŭ tiom alportis al tiu scienco, tio verŝajne estas, ĉar ili estis komplementaj. La unua, Jung, apartenis al la germana kulturo, la dua, Baudoin, al la franca, sed malgraŭ tio tre profunda kono de la alia kulturo permesis al ambaŭ konstantan dialogon. Tiu dialogo inter reprezentantoj de du kulturoj estas tipe svisa kaj tre favoris la serĉadon en multaj fakoj, precipe en psikologio.

Emil Ith, en la gazeto *L'Essor*, priskribas la ĉefajn trajtojn, kiuj karakterizis la kvalitojn de la verkoj de Charles Baudoin. Inter ili ni citu la konstantan zorgon havi stilon legeblan de nefakuloj sen tamen forferi la ekzaktecon kaj veron. Emil Ith citas longan eron el la verko *Psychologie et culture générale (Psikologio kaj ĝenerala kulturo)*, libro de Charles Baudoin, eldonita en 1931, kie tiu zorgo estas priskribita de la aŭtoro mem. Mi ŝatus traduki al vi la tuton, sed tio demandus tro da tempo. Mi nur kontentiĝas citi kelkajn belajn liniojn, kiujn ni devus memori ĉiufoje, kiam ni havas la malbonan ideon verki. Jen mi citas :

« Kiam la teknikaj kaj barbaraj terminoj povas esti ŝparataj al la leganto, tiu ŝparo devas esti, kaj ni bone atentu, tio ne devas celi senvaloran vulgarigon, sed la konstruon mem de la scienco. Majstro kiel Pierre Janet, daŭrigas Baudoin, ripetadas al siaj studentoj : « Ne serĉu ŝajni sciencaj ! » Kaj Freud, kiu, pli ol neniu alia, dum tiuj lastaj jaroj, ebligis al la psikologio realigi decidigajn progresojn, havas tiun grandan meriton paroli, pli ol aliaj, ĉies lingvon... » (Fino de la citaĵo.)

Charles Baudoin ĉiam denunciis la vulgarigadon kiel spiritan malhonestiĝon, sed por li la pedantismo, kun siaj ĵargonoj, estas ankaŭ spirita malhonestiĝo, kiu ofte kaŝas mankon de kapablo. Li diras acerbe : « Pedantismo estas disvastigita kiel lepro. Oni emas esti esotera kaj

Profesoro Charles Baudoin

Claude Gacond, 59-a radioprelego, 1964.01.15 & 18

sin ĉirkaŭi per nuboj ; kaj ne plu scipovante paroli la latinan, oni parolas ĵargonaĵaĉe. » (Fino de la citaĵo.)

La tempo rapide decidas pri la valoro de la verkoj. Kiuj servis dum sia tuta vivo la veron kaj la progreson de la sciencoj, tiuj estas nemorteblaj, ili daŭre vivas pere de siaj verkoj kaj influo. Charles Baudoin estas unu el tiuj nemortuloj, kies verkaro ne ĉesos disvastiĝi. La fiero de la esperantistaro povas esti, ke tiu homo, kiu tiom malamis la ĵargonojn de la pedantuloj, sin riskis prelegi kaj verki en ĵargono tiam mokata de la intelektularo.

Artikolo, publikigita en la gazeto *Coopération* okaze de la centjariĝo de Zamenhof, montras, kiun rolon povas havi edukistoj por la formado de la personeco de la morgaŭa interektularo. Charles Baudoin tie diras : « Mi estas unu el la privilegiitoj, kiuj ricevis ekde la lernejo instruadon de esperanto. En epoko, kiam oni ankoraŭ ne atentis pri tio en la oficiularoj, unu el niaj instruistoj pri la germana, ĉiurilate rimarkinda kaj radiantia personeco, organizis por ni en la liceo de Nancy liberan esperanto-kurson, kiu entuziasmigis, je la dektria jaro, sufiĉe grandan nombron inter ni... Se mi ne estus vivinta tiun eksperimenton, mi estus poste havinta rilate la lingvon internacian la antaŭjuĝojn, kiujn mi konstante trovas ĉe la ĉiustratuloj. » (Fino de la citaĵo.)

Povu tiu diro de Charles Baudoin kuraĝigi la edukistojn, kiuj, ofte en malfacilaj cirkonstancoj, daŭre instruas preskaŭ sen oficialaj subtenoj la mondan lingvon. Kaj povu mia prelegeto interesi tiujn samajn pedagogojn pri la verkaro de unu el la grandaj psikologoj de nia jarcento.

Vi aŭdis prelegon el Svislando pri profesoro Charles Baudoin. Nome de Radio Svislando Claude Gacond diras al vi, ĝis reaŭdo !

-oOo-